

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

IMPONA KONGRESO
DE BEA

NOVA ETAPO EN NIA
E - MOVADO

KONGRESAJ
SALUTPAROLOJ

SUKCESPLENA
SESIO DE ISEU

ESPERANTAJ
VOĈOJ EN
LA ASEMBLEO

SEPTEMBRAJ
VERSAĴOJ

LA ABONKAMPANJO
KOMENCIĜIS





IMPONA KONGRESO

SALUTON, DELEGITOJ!

5-an de julio 1985, 7,30 matene. La kongresa akceptejo, lokita en klubejo proksime de la Centra Sofia Stacidomo, jam estas preta akcepti la unuajn kongresajn delegitojn — reprezentantojn de Burgas kaj Ruse. Post ili alvenas Razgradanoj, poste — senditoj de la esperantistoj el Varna kaj Vraca, imponaj grupoj el la distriktoj de Veliko Târnovo kaj Plovdiv... la homa torento ĉesas flui nur al la 19-a horo. Sed la saman vesperon ĝi aperas en alia loko — en la halo de la Teatro de Junularo „Ljudmila Jivkova“, kie la Bulgara E-Teatro prezentas la komedion „Milionulo“ de Jordan Jovkov.

kalova kaj Bojĉo Mladenov, docento Georgi Dimov kaj Manol Ĉolev, Ivan Sivarov kaj Fani Miĥajlova... La ĉeforganizantoj rapidas tien kaj reen, surloke prenas decidojn, solvas problemojn — ja la delegitoj ne devas vane atendi, ili devas laŭeble plej rapide okupis siajn ĉambrojn — en la hoteloj kaj ripozi! Je ilia dispono estas la plej modernaj kaj luksaj hoteloj en la ĉefurbo: „Rodina“ kaj „Evropa“... En la akceptejo regas streĉiteco — esprimi de la bonega organizado akompananta la tutan antaŭkongresan laboron, samkiel la laboron de la forumo mem.

RAPORTAĴO EL LA KONGRESEJO

6-an de julio 1985, 9-a horo. Halo „Georgi Kirkov“. Jam ĉe la enirejo oni sentas la solenan kongresan atmosferon — sonas konvena por la okazo muziko kun Esperanta kaj bulgara teksto; la scenejo estas ornamita per la bulgara trikolora kaj la esperanta verda standardoj. Inter tiuj du simboloj — sur granda panelo en ĉiuj nuancoj de la verdo oni legas: 41-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio.

La prezidanto de Centra Estraro de BEA, la heroo de socialisma laboro Ĥristo Gorov oficiale malfermas la plej altan forumon de la bulgaraj esperantistoj. Sonas la himno de Popola Respubliko Bulgario kaj la Esperanta himno „La Espero“, plenumitaj de la reprezenta ĥoro „Rodna pesen“ (Patrolanda Kanto) el urbo Târgoviște. Tuj poste la membroj de la prezidantaro okupas siajn lokojn. Tio estas la gvidantoj de la centra asocia estraro, la prezidantoj de la distriktaj kaj societaj estraroj de BEA, veteranoj de nia E-movado, ĵurnalistoj. Inter la kongresaj gastoj estas Sava Dălbokov, unua vicprezidanto de la Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto; Atanas Konstantinov, Violeta Musakova, Ivan Sotirov kaj Stanjo Stanev — sociagantoj; Todor Angelov — ĉefsekretario de la Ministerio de Popola Klerigo, Zarko Gogov — estro de fako en CK de la Dimitrova Komunista Junulara Unuiĝo (DKMS), reprezentantoj de publikaj organizaĵoj, de ministerioj kaj centraj departementoj. La kongreson ĉeestas ankaŭ senditoj de la esperantistaj asocioj el kvin socialismaj lan-

(Daŭrigo sur p. 6)

En la kongresa akceptejo

Dum tiu antaŭkongresa tago la laboro de la akceptejo daŭris preskaŭ 12 horojn. Dum ĉiuj ĉi horoj oni aŭdis: „Bonan tagon! Bonvolu, jen estas via delegita karto, mangokuponoj, hotela karto, la kongresaj dokumentoj kaj la invito por la teatra spektaklo!“ Esperanta parolo, ridetoj, demandoj kaj respondoj, konataj kaj nekonataj vizaĝoj... venas kaj foriras Jana Ci-



NOVA ETAPO EN LA EVOLUO DE NIA E-MOVADO

(El la raporto de CE de BEA antaŭ la delegitoj
de la 41-a Kongreso)



Aristo Gorov, prezidanto de BEA, legas la kongresan raporton

Nia 41-a kongreso okazas en jaro riĉa je rimarkindaj eventoj — 40 jaroj de la venko super Hitler-faŝisma kaj japana militarismo; 30 jaroj de la Varsovia Kontrakto kaj 10 jaroj de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo. La 40-jariĝo de la venko super faŝismo transformiĝis en tuthomaran plebisciton kontraŭ la militminaco.

Dece, kun kliniĝo antaŭ la sinofero de la herooj, la bulgaraj esperantistoj festis la Venkotagon. Forpelinte la invadintojn el sia teritorio, la Soveta Armeo daŭrigis sian liberigan marŝon kaj kune kun la aliancanoj el la kontraŭfaŝisma koalicio finis la militon, rezulte de kio ebligis al la eŭropaj popoloj liberiĝi el la ĉenoj de la faŝismo kaj vivi en kondiĉoj de paco, laboro kaj sekureco.

Sian lokon en la heroo batalo de la liberamaj popoloj trovis ankaŭ nia lando sub la gvido de la Bulgara Komunista Partio.

Je la prezo de dekmiloj da viktimoj la juna bulgara popola armeo kontribuis por la definitiva frakaso de la Hitler-faŝismo kaj por savo de la homa civilizo. Inter la herooj pereintaj en Jugoslavio, Hungario kaj Aŭstrio estis ankaŭ esperantistoj — Vasil Demirevski, Stefan Halaĉev, Ilija Miĥajlov, Dimităr Spasov, Aleksandăr Piponkov-Capaj kaj multaj aliaj.

La bulgaraj esperantistoj unuanime subtenas la sovetan Alvokon al la popoloj, parlamentoj kaj registaroj de ĉiuj landoj, per kiu oni substrekas, ke plej grava celo de la sovetaj ŝtatoj estas defendo de la paco. Ili popularigas ĝin per siaj internaciaj ligoj.

PR Bulgario sendevie realigas la principojn de sia ekstera politiko — politiko de reciproka kompreniĝo kaj vasta dialogo kun aliaj popoloj, konstruiva politiko al Balkanio por ties transformo en sennuklearmilan zonan.

INTERNACIA AGADO

En sia internacia agado Bulgara Esperantista Asocio sekvis la principojn de la socialisma internaciismo kaj paca kunekzistado. Apogante sin sur tiuj principoj, ni elpaŝisen internaciaj forumoj, kie ni renkontiĝis kun diversaj politikaj kaj religiaj agantoj. Nia Asocio organizis vastskalan kampanjon defende al la paco kaj kolektis pli ol 100 mil subskribojn por la paco de esperantistoj kaj aliaj civitanoj. Tiu dokumento de pacamo estis transdonita al la Sekretariato de UN.

La konsultiĝoj de E-Asocioj el la socialismaj landoj estiĝis ĉiujara tradicio kun granda utilo por nia partopreno en la evoluigo de la tutmonda esperantista movado. Ĉi-jare la konsultiĝon en la

Internacia Esperanto-Kursejo — Pisanica, unuafoje partoprenis reprezentantoj de Kubo kaj Rumanio.

Nia internacia agado dum la raportata periodo ampleksis pli ol 100 aranĝojn. Krom tio en la plimulto da distriktoj okazis regionaj aranĝoj kun internacia partopreno.

La naciaj jubileaj eventoj estis oportuna okazo por riĉenhava manifestigo de niaj kreaj kolektivoj. La celebrado de la 1300-jariĝo de Bulgario pasis kiel longdaŭra kaj celdirektita kampanjo. En 1981 du artistaj trupoj vizitis Sovet-Union, Germanan Demokratian Respublikon kaj Hungaron kaj prezentis variajn artprogramojn pri la jubileo; aperis riĉe ilustrita jarnumero de revuo „Bulgarino“, kiu estis sendita al E-aktivilinoj en multaj landoj.

Okazis scienc-praktika konferenco „1300 jarojn Bulgario“ en Sumen, en kiu partoprenis ankaŭ gastoj el kelkaj landoj. Al la sama datreveno estis dediĉita la Tria Konferenco de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) en Ruse.



En la kongresejo

Lige kun la 60-jara datreveno de la heroo Septembra Ribelo 1923 grupo da artistoj vizitis niaŭ urbojn en la sudaj respublikoj de Sovet-Unio.

Kaj por ni, esperantistoj, reviviĝis la rememoro pri la unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo. Urbo-gastiganto de la Scienc-Praktika Konferenco estis Stara Zagora. Krom bulgaraj esperantistoj partoprenis artistoj el Leningrado, raportantoj el Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario.

Okaze de la 40-jariĝo de la venko de la Naŭseptembra Socialisma Revolucio niaj delegitaroj vizitis Pollandon, baltajn Sovetajn respublikojn,

Leningradon kaj Moskvon, konigis al la publiko la sukcesojn de la socialisma konstruado ĉe ni kaj prezentis riĉan belartan programon.

Al la sama datreveno estis dediĉita la Scienc-Praktika Konferenco en Velingrad. Cestis gastoj el Sovet-Unio, Aŭstrio, Pollando kaj Hungario.

Je alta organiza kaj idea nivelo pasis la Scienc-Praktika Konferenco omaĝe al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov. Tio estis migranta konferenco, pasinta tra la Domo-muzeo „Georgi Dimitrov“ en Sofio, Pernik kaj la naskiĝdomo de Dimitrov en vilaĝo Kovaĉevci. Partoprenis per referaĵoj partiaj funkciuloj kaj agantoj de BEA. La naskiĝtago de G. Dimitrov honoris ankaŭ senditoj de la E-asocioj de Sovet-Unio, Pollando, GDR, CSSR.

Por unuigo de la diversaj generacioj kontribuis la 75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio, kiu transformiĝis en internacian feston kaj levis ankoraŭ pli alte la aŭtoritaton de nia Asocio. Esperantistaj agantoj el Sovet-Unio, Pollando, GDR, CSSR, Hungario, Jugoslavio, Francio, Hispanio, FRG, Italio kaj Turkio venis por festi kun ni. Tiukaze oni aranĝis ekspozicion, kiu kun granda sukceso estis prezentita en Budapeŝto, Vankuvero, Götteborg kaj ĉi-momente troviĝas en Sovet-Unio.

Granda internacia aranĝo estis la 36-a Kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEJ) en Suna Bordo. La tuta riĉenhava kulturprogramo estis prezentita de niaj kantistoj, muzikistoj kaj dancaj kolektivoj. La fervoja sekcio ĉe BEA kontentige faris la preparlaboron kaj grave helpis la okazigon de la Kongreso.

Kiel konate, post du jaroj ni festos plej solene la 100-jariĝon de la historia kreaĵo de Zamenhof — la Internacia Lingvo Esperanto.

La jubileo prezentas por ni unikan okazon stabiligi la ligojn kun niaj eksterlandaj amikoj, rakonti al ili pri la atingoj de Esperanto en Bulgario, memori al ili, ke hodiaŭ ne estas pli grava tasko ol la konservo de la paco.

La jubileo stimulas la kunlaboradon inter la balcanaj E-asocioj kaj organizaĵoj. Esperiga formo de tia kunlaboro estis la okazinta en oktobro 1984 en Ateno Dua Balkana E-Kongreso, dum kiu oni prenis konkretajn decidojn pri ĉiujaraj aranĝoj, pri uzado de Esperanto en la ĉiutagaj kontaktoj.

Lige kun la centjara jubileo de Esperanto nia Asocio starigis kontaktojn ankaŭ kun E-organizaĵoj kaj rondoj en Afriko, Azio kaj Latin-Ameriko. Necesas firmigi tiujn kontaktojn, helpi la malfortajn organizaĵojn en la menciitaj landoj, sendante niajn revuojn kaj literaturaĵojn en Esperanto.

ELDONADO KAJ PRESAĴPROPAGANDO

La eldonaĵoj servas kiel mirinda ligilo inter la popoloj. La bulgara literaturo — tio estas heroaĵo, abnegacio, patriotismo kaj internaciismo. Per Esperanto la bulgaraj verkistoj kaj iliaj verkoj populariĝas trans la limoj de nia patrujo.

Dum la raportata periodo la fremdlandaj esperantistoj havis eblecon konatiĝi kun „Apostolo de la libereco“ de Mercia MacDermott, „Vilaĝo Borovo“ de Krum Velkov, „Mia vivo“ de Trifon Aristovski, „Naŭ jarojn en la infero“ de Naĉo Kemalov, „Glacikovrita ponto“ de Ljuben Stanev, „Rodopa falco“ de Jantaj Kavalov, kun la antologio „Septembro estiĝos majo“, kompilita de Nano Kjuĉukov. Originalan verkaron enhavu s „Almanako de bulgaraj esperantistoj“, kompilita de Asen Grigorov. En la almanako estas prezentitaj 30 bulgaraj aŭtoroj, kiuj verkas en Esperanto.

La evoluetapo, kiun eniris nia lando, estas tute pro granda elprovo ankaŭ por la esperantistoj-jurnalistoj. La organo de BEA „Bulgara Esperantisto“ plibonigis sian eksterajn kajenhavon, iĝis pli interesi kaj varia revuo. Tamen ĝi devas esti ankoraŭ pli proksima al la aktualaj taskoj, devas mobilizi la fortojn de la bulgaraj esperantistoj por ties realigo, propagandi la sperton de la avangarduloj en niaj vicoj. La Kongreso komisiis al la redakcio aperigi altkvalitajn materialojn je monda nivelo, varbi novajn abonantojn eksterlande.

Revuo „Paco“ jam firmiĝis kiel aŭtoritata periodaĵo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). La klopodoj de la redakcio pri variigo de la enhavo sukcesis. „Paco“ mobilizas al batalo por malebligo de la militarismo de la kosma spaco, por bridado de la vetarmado.

Regule aperas ankaŭ kelkaj E-bultenoj. Plibonigis la ekstera arango de ili, el ili, plialtiĝis la profesia nivelo de la kunlaborantoj.

La sukcesoj en kinofurnalismo ĝojigas. Bulgara Televido produktis koloran dokumentfilmon „Leĉiono de Esperanto“, kiu ĝuis grandan sukceson.

Kun akcelita ritmo oni laboris super la televida filmo pri Trifon Aristovski, kiu revivigis sur la ekrano la emociantan figuron de la heroo — komunisto kaj esperantisto.

Estis kreita ankaŭ la filmo „Verdaj steloj“, kiu respegulis la laboron de la 36-a Kongreso de IFEF. Alian dokumentan filmon produktis la amatora kinoklubo en Smoljan, dediĉitan al la duonjarcenta jubileo de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio.

Notante la atingitajn sukcesojn, ni vidas post ili novajn suprojn, kiujn ni devas surgrimp. Revolucia pensado donos novan impulson al la publicistiko, helpos nin ne sklavi al ŝablonoj. La enhavo de la eldonaĵoj devas esti ĉiam aktuala. Nia publicistiko devas esti je la nivelo de plej bonaj modeloj.

INSTRUAGADO

Laŭ propono de la Instruista Sekcio ĉe BEA, la Ministerio de Popola Klerigo enkondukis fakultativan instruadon de Esperanto en iujn mezlernejojn. Rezulte de tiu tre grava akiraĵo ekestis problemo pri kvalifikitaj instruantoj, sen kiuj eblas malsukcesi. Por ke tio ne okazu, en IEK-Pisanica



Momento el la balotado por gvidorganoj de BEA

kreiĝis kondiĉoj por kvalifikado kaj rekvalifikado de instrukadroj, precipe el la medio de instruistoj de fremdaj lingvoj. En julio kaj aŭgusto en la kursejo estas preparataj instruistoj en ĉiuj gradoj. Krom en IEK-Pisanica, iuj distriktaj estraroj mem okazigas kursojn por kursgvidantoj. Tiurilate la ekzemplo de la Distrikta Estraro de BEA — Sofio, meritas atenton kaj imiton. Aplikante la miksitan forestan-ĉeestan formon de instruado, DE de BEA—Sofio, preparis dum la lastaj du-tri jaroj plenrajtajn instruantojn de Esperanto por 32 mezlernejoj, t. e. por ĉiuj lernejoj de la distrikto. Per fakultativa instruado oni engaĝis ĉirkaŭ 650 gelernantojn.

Strebo de ĉiu distrikta estraro devas esti: ĉiu lernejo — kun sia plenrajta kursgvidanto.

Ankaŭ en la E-kursoj por plenaĝuloj estas bezonataj bonaj instruistoj. Estas konate, ke la preparo kaj nivelo de la instruanto havas decidigan signifon por la sukceso en la instrulaboro. Krom la kursoj por komenccantoj, ĉiuj E-societoj devas enkonduki instruformon por progresintoj.

Urĝa estas la tasko de nia asocio pri eldonado de propagandaj materialoj en bulgara lingvo, adresitaj al laboristoj kaj agrikulturistoj, al junuloj el la laborkolektivoj

PRI LA LABORO DE LA SEKCIOJ LAŬ PROFESIOJ KAJ INTERESOJ

La Centra Estraro de BEA turnis apartan atenton al la sekcioj ĉe la Asocio, kiuj estas profesiaj, scienc-teknikaj, kulturaj kaj laŭ interesoj.

Forĝejo de novaj instrukadroj estas la Instruista

Sekcio. Kunlabore kun la Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj, ekde tri jaroj la Sekcio okazigas specialajn kursojn por instruantoj kaj zorgas pri ilia perfektigo. Estis organizitaj ankaŭ du seminarioj.

Ciujara arango de la Junulara Sekcio estas la Revuoj de Esperanta Parolo kaj Kanto. Ĉi-princlipe en Ĥaskovo okazis la XVIII Revuo kun partopreno de 800 artamatoroj. La Revuo estis dediĉita al la 40-jariĝo de la venko super faŝismo. Ĝi pasis je alta idea-politika, estetika kaj organiza nivelo.

La Revuoj evidentigis elprova kaj trafa formo por kreaĵ manifestiĝoj de l'Esperanta junularo. Lige kun altiĝo de la idea-arta nivelo de l'Revuoj CE de BEA eldonis konvenajn helpmaterialojn.

La Esperantan amatoran artaktivadon la distriktaj estraroj kaj societoj devas kuraĝigi spirite kaj materiale.

La Filologia Sekcio havas taskon labori por la lingva perfektigo de la kadroj. La Sekcio okazigas seminariojn kaj aktivecojn por la filologoj-esperantistoj. Ĉi-jare la Sekcio eldonas ampleksan libron kun interlingvistikaj kaj esperantologiaj artikoloj.

Bone laboras ankaŭ la sekcioj de medicinistoj, agrikulturaj specialistoj, poŝtistoj, artistoj, k. a.

ORGANIZA AGADO

La organiza agado kiel plej grava ĉenero, kiel „motoro“ de la Asocia laboro, ĉiam staris unuafoje dum la raportata periodo. La Centra Estraro

regule okazigis plenkunsidojn, en kiuj oni starigis demandojn pri la Asocia agado. Inter ili ĉefloke staras plenkunsidoj dediĉitaj al la plej superaj partiaj forumoj — la XII Kongreso de BKP kaj la Nacia Partia Konferenco pri la Kvalito. Dum la plenkunsidoj oni priparolis la Asocian agadon tra la prismo de tiuj gravaj por la vivo de nia lando eventoj. La plenkunsidoj pritraktis la longdaŭran planadon kaj la ekonomian agadon. Estis akceptita kompleksa programo, kiun post dujara periodo oni aktualigis. Estis priparolataj demandoj pri la partopreno de la esperantistoj en la pachtalo, konkurado, 100-jara jubileo de Esperanto k. a. La prenkunsidaj decidoj kontribuis por vigligo de l'Asocia agado, por ties starigo sur nova, pli firma bazo.

Similan rolon ludis la plenkunsidoj de l'distriktaĵ organiziaĵoj.

La plimulto el la kadroj plijuniĝis. Al sia 41-a kongreso Bulgara Esperantista Asocio alpaŝas nun 43 novaj societoj kaj 9300 membroj, organizitaj en societoj, kluboj kaj lernejanaj sekcioj. Tio signifas, ke nun triono de la membroj estas novaj kaj nia devo estas reteni ilin en la organizaĵo kaj edukii ilin en klaspartia, patriotisma kaj internaciisma spirito.

Ĉio ĉi estas grandparte rezulto de la streboj de CE kaj DE de BEA samkiel de la plibonigita kunlaboro kun la amasorganizaĵoj laŭ regionoj. La plimulto de la aranĝoj de societoj kaj DE estas iniciatoj komune realigitaj kun la komitatoj de Patrolanda Fronto, sindikatoj, Komsomolo, porpacaj komitatoj, popolaj legejoj, la Movado de Bulgaraj Virinoj kaj aliaj amasaj organizaĵoj kaj movadoj.

Grava devo de la gvidantoj de BEA estas garanti favoran moralan-psikan klimaton en la kolektivo. Necesas pli da kolektivismo, kaj ĝi inkluzivas plibonigon de produktadaj, soci-politikaj kaj moralaj rilatoj.

Ni estas profunde dankaj al la Centra Komitato de BKP, al nia unua partia kaj ŝtata gvidanto k-do Todor Jivkov pro la zorgoj kaj subteno, kiujn ĝuas Esperanto en nia lando. Nia volo kaj strebo estas ĉiam esti indaj je la partia fido, rekompenci la zorgojn per novaj faroj.

Kiel patriotoj kaj internaciistoj, en nia internacia agado ni batalos kontraŭ la militamaj fortoj de la imperiismo, kiuj preparas „stelajn militojn“ kaj strebas likvidi la homan civilizon. Firme unuigitaj ĉirkaŭ la partio, ni kune kun la esperantistoj el la frataj socialismaj landoj marŝos en la unuaj vicoj de la batalantoj por paco kaj tuthomara progreso.

Ni estas konvinkitaj, ke nia 41-a kongreso kontribuos por ankoraŭ pli forta unueco de la bulgaraj esperantistoj kaj ili defendos kaj grados la dignon de PR Bulgario ĉie en la mondo, inspiritaj de la superaj celoj kaj intereso de nia popolo.



Memorfoto antaŭ la Nacia Artgalerio



**EL LA SALUTPAROLO DE SAVA DĂLBOKOV,
UNUA VIC-PREZIDANTO DE LA NACIA
KONSILANTARO DE PATROLANDA FRONTO:**

Karaj delegitoj,
Estimataj gastoj,

En la raporto de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio oni donas pozitivan pritakson al la laboro farita post la 40-a jubilea kongreso de la Asocio. Ni plene konsentas kun tiu pritakso kaj sincere ĝojas pri viaj sukcesoj, ĉar ili estas ankaŭ niaj sukcesoj, sukcesoj de la Patrolanda Fronto, kies kolektiva membro estas Bulgara Esperantista Asocio.

Meritas laŭdon kaj kuraĝigon via aldonata helppa ekonomia agado, permesita per speciala dekreto de la Ministra Konsilantaro, per kiu agado vi donas vian realan kontribuon al la produktado de varoj por popola konsumado kaj de servoj por la loĝantaro. Samtempe tio garantias al BEA rimedojn por realigo de riĉa kaj varia agado.

Memkompreneble, por la konstruo de evoluanta socialisma socio en nia patrolando estas necesa la produktiva laboro de la tuta popolo, inkluzive de la bulgaraj esperantistoj. La Centra Estraro, la distriktaj kaj societaj estraroj de BEA devas informi kiel laboras la membroj de la Asocio, interesi pri iliaj sukcesoj, distingi laŭmerite la plejbonulojn en la laboro, kiuj faras heroaĵojn sur la laborfronto, partoprenas konscie kaj aktive en la konstruado de la matura socialisma socio.

Per sia internacia agado la bulgaraj esperantistoj kontribuas por popularigo de la ĉiufan-kaj sukcesoj de Popola Respubliko Bulgario en la tuta mondo, rakontas la veron pri nia nova vivo, repuŝas la kalumniojn kaj atakojn kontraŭ

nia kara Patrolando. La bulgaraj esperantistoj disvastigas malproksimen trans niaj landlimoj la veron pri nia sincera pacama ekstera politiko, pri la fideleco de nia popolo al la faro de la paco kaj kunlaborado inter la popoloj.

Ni bondeziru, ke en la venontaj jaroj la kunlaborado inter la Patrolanda Fronto, la ceteraj publikaj organizaĵoj kaj la Bulgara Esperantista Asocio plivastiĝu, leviĝu sur pli alta nivelo, ligiĝu ankoraŭ pli intime kun la novaj taskoj, kiujn la Bulgara Komunista Partio starigas antaŭ la tuta popolo.

Permesu al mi, gekamaradoj delegitoj, fini per via flugilhava slogano: „Per Esperanto — por paco en la mondo, por amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj, por sociala kaj kultura progreso!“



EL LA ELDIRO DE TODOR ANGELOV, ĈEFSEKRETARIO DE LA MINISTERIO DE POPOLA KLERIGO:

En la progresema monda movado por amikeco kaj paco, por humaneco, libero kaj veraj homaj interrilatoj inter la popoloj la movado por ekposedo kaj aplikado de Esperanto transformiĝis en gravan faktoron en la monda kultura praktiko.

Dum sia multjara historio la Bulgara Esperantista Asocio akiris sperton kaj prestiĝon, disvolvis agadon, kiu meritas nian rekonon kaj dankemon.

La lernejo ĉiam estis kaj restas centro por disvastigado, por instruado de Esperanto. La nuna bulgara socialisma lernejo disponas pri variaj formoj de patriota kaj internacia edukado, tamen malgraŭ tio ĝi ne eliminis, sed male, aplikas ankaŭ Esperanton al la celoj de la internacia edukado, por formado de komunistaj moralaj kvalitoj ĉe la lernantoj.

La Ministerio de Popola Klerigo alte taksas la agadon de Bulgara Esperantista Asocio kaj rilatas helpeme kaj estimplene al ĝiaj noblaj streboj.

Tion konfirmas ankaŭ la fakto, ke Esperanto estas instruata en la bulgaraj lernejoj. Nun pli ol 3500 gelnernantoj en pli ol 200 klasoj kaj studrondoj en IX kaj X klasoj de la Unuecaj Mezaj Politeknikaj Lernejoj, en I kaj II kursoj de la Mezaj Teknikaj Lernejoj kaj de la Mezaj Faklernejoj kun intereso ekposedas Esperanton.

Gojiga estas la fakto, ke depost unu jaro en nia lando oni komencis instrui Esperanton kiel devigan lernobjekton en VIII Unueca Meza Politeknika Lernejo „V. Levski“ —

Sofio. Tiu unua diplomitaro finos siajn studojn en la jaro 1987, kiam la esperantistoj el la tuta mondo celebros la 100-jariĝon de la internacia lingvo Esperanto.

Fine, gekamaradoj, permesu al mi en la nomo de la Ministerio de Klerigo, kaj speciale en la nomo de ministro Aleksandâr Fol, bondeziri al la bulgaraj esperantistoj kaj antaŭ ĉio al la bulgaraj geinstruistoj kaj gelnernantoj-esperantistoj sanon, fortojn kaj entuziasmon. Ili estu ĉiam en la unuaj vicoj de la batalo por paco kaj interkompreniĝo de la popoloj, utiligante la internacian lingvon Esperanto por la bono de la popoloj el la tuta mondo, por la prospero kaj supreniro de nia socialisma patrolando!

IMPONA KONGRESO

(Daŭrigo de p. 3)

doj: Evĝenij Tuganov, reprezentanto de la Asocio de Sovetiaj Societoj por Amikeco kaj Kulturliĝoj kun Eksterlando, salutis la kongreson en la nomo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj; Andrej Lukaĉ — reprezentanto de la Asocio de Esperantistoj en la Slovaka Socialisma Respubliko; Vera Podhradská kaj Jaroslav Kašparec — el la Ĉeĥa Esperanto-Asocio; Ljudmila Hipius kaj Manfred Arnold el la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR; Eva Farkaš-Tatar el la Hungara Esperanto-Asocio; Gorĝe Dragojloviĉ, reprezentanto de la Jugoslavija Esperanto-Ligo.

La unuan kongresan kunsidon gvidis la E-veterano Nikola Aleksiev — heroo de la socialisma laboro, honora prezidanto de MEM. En sia mallonga enkonduka parolo li tuŝis du bazajn direktojn en la kongresa laboro, difinitajn de la konkreta historia momento: sukcesa plenumo de la oka kvinjara plano kaj batalo por defendo de la paco — batalo, en kies unuaj vicoj estas ankaŭ la bulgaraj esperantistoj.

Per unuminuta silento la delegitoj omaĝis al la memoro de la elstara agantino de la bulgara kulturo, la honora prezidantino de la 34-a TEJO-Kongreso Ljudmila Jivkova kaj de la forpasintaj meritaj membroj de BEA en la periodo inter la du kongresoj—Asen Grigorov, Stefan Minkov, Ivan Sarafov, Zora Mladenova-Hans, Atanas Atanasov-Ada, Meleŝko Ŝiŝkov, Simeon Petrov, Vladi Vâlĉev, Stefan Popov.

La kongresa laboro daŭris per la raporto, farita de la prezidanto de BEA Hristo Gorov, kiu faris bilancon de la kvinjara agado de la bulgaraj esperantistoj kaj konturis la antaŭstarantajn taskojn.

La delegitoj tondre aplaudis la eldiron de Sava Dâlbokov, per aplaŭdoj interrompis la salutparolon de Todor Angelov, kiam li alte pritaksis la eksperimenton en VIII Sofia Mezlernejo.

La impresigema E-aŭditorio emocie akceptis

ankaŭ la vortojn de Manfred Arnold, kiu de sur la kongresa tribuno esprimis sian profundan adoron al la vivo kaj agado de Trifon Hristovski, kaj la eldiron de Eva Farkaš-Tatar, enamiĝinta en la bulgaran popolon kaj ĝian historion.

En la dua kaj tria kongreskunsidoj, prezidatj de Petâr Todorov — membro de la Buroo de UEA kaj vicprezidanto de BEA, kaj de Dimitâr Papazov — sekretario de BEA kaj sekretario de la Balkana Esperantista Kunordiga Komitato, la kongresanoj aŭskultis entute 16 eldirojn: de Canko Ignev, Nikola Uzunov, prof. d-ro Kiril Popov, Kanjo Kanev, Petko Arnaudov, Angel Todorov, Georgi Litov, Stefka Toteva, Dimo Trudoljubov, Steliana Dimitrova, Jordan Angelov, Ivan Ĉulev, Dimitâr Mutuŝev, Vâlka Dobrev, Stojan Pavunĉev kaj Dimitâr Haĝiev. Dum la kvara kunsido, gvidita de la prezidanto de BEA Hristo Gorov, eldirojn faris ankoraŭ tri delegitoj — Stefan Raŝkov, Nikola Pilev kaj Petko Bonev.

Inter la dua kaj tria kunsidoj la kongresanoj metis florkronon antaŭ la maŭzoleo de Georgi Dimitrov. Tiamaniere la bulgaraj esperantistoj esprimis sian adoron al la memoro de la granda gvidanto kaj instruanto de nia popolo, elstara aganto de la internacia laborista kaj komunista movado.

La komuna foto, farita antaŭ la Nacia Belarta Galerio sur placo „Deveti Septemvri“, restos ne nur valora dokumento en la kongresa arkivo, sed ankaŭ kara memoraĵo por la kongresanoj. En la tagmeza paŭzo la kongresanoj sukcesis trarigardi la foto-ekspozicion, aranĝitan en la vitrinoj sur bulvarado „Ruski“ en la ĉefurba centro. Multaj fotoj prezentis al la ĉefurbanoj la historion de la E-movado, precipe ĝian evoluon en Bulgario.

Dum la kongreso ĵurnalistoj el Bulgara Telegrafa Agentejo (BTA), la radio kaj la gazetaro

laboris en la gazetara centro; en la kongresejo estis ankaŭ reprezentantoj de la televido. Alvenis multaj saluttelegramoj el Bulgario kaj el eksterlando: de laboristoj el la filio de la Ekonomia Direkcio „Globus“, de la Unuiĝo de Bulgaraj Filatelistoj, el USSR — de litovaj kaj kievaj esperantistoj, de la Viena Esperanta Komunista Kolektivo, de la sveda familio Erling kaj Inger Palerhag el urbo Jobro.

La kongresa laboro daŭris dum la tuta tago, ĝis 19,30 horo.

RENKONTIĜOJ DUM LA PAŬZOJ

Fakte dum la minutoj destinitaj por ripozo la kongresa laboro ne ĉesis, ĉar en la fumsalonoj la delegitoj interŝanĝis opiniojn, komentariis. Mi turnis min al iuj el ili kun nura demando: „Via opinio pri la kongreso?“

Tinka Lakova — veterano de BEA:

— Al Esperanto mi dediĉis 60 jarojn. La unua kongreso, kiun mi ĉeestis, okazis en Varna en 1926—tiam mi estis lernantino! Poste mi vizitis multajn aliajn kongresojn, sed la nuna nia 41-a kongreso estas la plej bone organizita, plej impona kaj ĉe plej bonaj kondiĉoj okazinta nacia kongreso. Mi opinias, ke ĝi montras la supreniron kaj la kreskintajn eblojn de nia E-movado kaj respondas al la nivelo de niaj nunaj E-kadroj.

Venecij Georgiev — ĉefredaktoro de gazeto „Septemvrijska Pobeda“ — Pleven:

— Jam antaŭ la malfermo de la kongreso la delegitoj el Pleven eksentis tre gravan organizan momenton: disciplino kaj respondeco. Min impresis la severe analiza karaktero de la raporto, la klara perspektivo pri la antaŭstarantaj taskoj. Grava atingo de nia E-movado en la nuna etapo estas, ke oni zorgas ne nur pri la instruado kaj propagandado de Esperanto, sed ankaŭ pri ĝia aplikado en diversaj sferoj de la vivo, rezulte de kio kreskas la socia rolo de la bulgaraj esperantistoj en la kondiĉoj de konstruado de evoluinta socialisma socio en nia lando.

Merita aktorino Luna Davidova — el la Bulgara Esperanta Teatro:

— Tiel bone kaj organizite pasas la kongreso, ke oni malfacile povas imagi kiom da fortostreĉoj kaj laboro sin kaŝas malantaŭ tiu ŝajna trankvilo. Por la sofiaj esperantistoj eble pli interesaj estas la eldiroj, starantaj ekster la agadsfero de nia E-organizajo, ĉar de ili ni ekscias multajn novajn faktojn. Al mi faris impreson la eldiroj de la reprezentantoj de Stara Zagora, Gabrovo k. a.

Merita aktorino Rene Jordanova — laŭreato de Dimitrov-premio (Stara Zagora):

— Multe da junaj vizaĝoj mi vidas en la kon-



Maria Jankova (dekstre) intervjuas Ljubomir Trifončovski el Vraca

gresejo. Do ni povas kredi pri la estonto de nia E-movado!

Ljubomir Trifončovski — membro de la Buroo de DE de BEA en Vraca:

— En tiu ĉi kongreso oni efektive sentas revolucionan pensadon — oni parolas pri pli rapida enkonduko en la praktikon pere de Esperanto de novaj sciencaj kaj teknikaj atingoj. Ĉu tiamaniere ni ne respondas al la taskoj starigitaj de la Februara Plenkunsido de CK de BKP? Ĉu ni ne vidas, ke Esperanto same estas vojo por plibonigo de la kvalito ĉie kaj en ĉio?

LA KONGRESO EN FAKTOJ KAJ CIFEROJ

En la kongreso partoprenis:

— 771 delegitoj el entute 891 elektitoj de la distrikta konferenco.

— 432 viroj kaj 339 virinoj.

— laŭ socia deveno — 82 laboristoj, 18 kamp-laboruloj, 513 oficistoj en diversaj branĉoj de la nacia ekonomio, inkluzive inĝenierojn kaj aliajn specialistojn, 14 scienculoj, 22 lernantoj kaj studentoj, 122 pensiuloj.

— 97 delegitoj, distingitaj per ŝtataj premioj, inter ili per ordeno „Georgi Dimitrov“ — 4 personoj, per ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — 14 personoj, per „Popola ordeno de laboro“ — 23 personoj, per ordeno „Kiril i Metodij“ — 35 personoj k. a. Aliaj 112 delegitoj estas distingitaj per altaj ŝtataj distingoj.

— 158 delegitoj estas en la aĝo ĝis 30 jaroj, 154

delegitoj estas 30-40-jaraĝaj, 218 — 40-50-jaraĝaj, 168 — 50-60-jaraĝaj, kaj 73 delegitoj estas pli ol 60-jarojn aĝaj.

— Laŭ Esperanta staĝo: 207 delegitoj — inter 1 kaj 5 jaroj, 118 — inter 5 kaj 10 jaroj, 119 — inter 10 kaj 20 jaroj, 182 — inter 20 kaj 40 jaroj kaj 145 — kun pli ol 40-jara staĝo en la E-movado.

* * *

Post la raporto de la Mandata Komisiono estis akceptitaj la kongresa rezolucio, la ŝanĝoj kaj kompletigoj al la Statuto de BEA, estis anonciataj la rezultoj de la antaŭkongresa konkurado inter la esperantistaj societoj, la distriktaj estraroj de BEA kaj la asociaj sekcioj, kaj estis elektitaj novaj honoraj membroj de BEA. Poste, en la nomo de la kongreso, estis sendita telegramo al CK de BKP kaj estis akceptitaj Alvoko al la esperantistoj el la tuta mondo por ankoraŭ pli aktivaj agoj defende al la paco kaj Deklaracio defende al la senmotive malliberigita fare de la italaj aŭtoritatoj bulgara civitano Sergej Antonov.

Fine la delegitoj alpaŝis al elekto de nova Centra Estraro de BEA kaj de nova Centra Kontrola Komisiono, voĉdoninte, ke ili konsistu el respektive 135 kaj 8 membroj. Post anonco de la rezultoj de voĉdonado, okazis la unua plenkunsido de la nova Centra Estraro, kiu elektis

Buroon de CE de BEA, kaj la unua kunsido de la nova Centra Kontrola Komisiono, kiu elektis sian estraron. Ĉe la fermo de la kongreso Hristo Gorov, kiu estis reelektita kiel prezidanto de BEA, dankis al la partoprenantoj en la kongreso kaj al ĝiaj organizantoj, sub la gvido de la prezidanto de la Kongresa Komitato Dimitar Papazov kaj de la prezidantino de la Sofia Urba Organizaĵo de BEA d-rino Cveta Stamenova. La prezidanto de BEA rekomendis al la delegitoj informi ĉiujn asociajn membrojn pri la kongresaj laboro kaj decidoj.

La saman vesperon kantistoj kaj artistoj-esperantistoj donis solenan koncerton por la delegitoj kaj gastoj de la kongreso. La programon gvidis Belka Beleva. Partoprenis: la ĵunpionira kantgrupo „Diverskoloraj Kravatoj“ el Bojuriŝte, la merita aktorino Luna Davidova, la operkantistino Jana Cikalova el Ruse, Ivan Zlatev, Dobrinka Todorova el Miĥajlovgrad, Antoaneta Pavlova el Gorna Orjahovica, la merita artisto Veselin Damjanov, Maria Angelova, kvarteto „Orbita“, Angelina Sotirova kaj la reprezenta ĥoro „Rodna Pesen“ el Târgoviște, kiu denove plenumis la esperantan himnon.

Kaj kia pli impona komenco kaj pli emocia fino ol la flugilhavaj Zamenhofaj vortoj!

Maria JANKOVA-BOJAĜIEVA

TELEGRAMO

Al la
Centra Komitato de
Bulgara Komunista Partio
Sofio

Karaj gekamaradoj,

La 41-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, raportinte la atingojn en disvastigo de Esperanto inter junuloj, laboruloj kaj lernantoj kaj preninte decidojn por plua aktivigo de la agado de miloj da esperantistoj, esprimas al vi ilian profundan dankon pro la konstantaj zorgoj de la Partio pri senĉesa stabiligo kaj evoluigo de la Esperanto-movado en Popola Respubliko Bulgario. La bulgaraj esperantistoj tre bone scias kion reale signifas la Lenina aprila politiko de la Partio por la prospero de la bulgara esperantista movado.

La alvoko de nia unua partia kaj ŝtata gvidanto kamarado Todor Jivkov „Faroj, faroj kaj denove faroj“ inspiras ankaŭ la bulgarajn esperantistojn aktive partopreni la laboron por realigo de la decidoj de la XII Kongreso de Bulgara Komunista Partio por ĝustatempa plenumo de la starigitaj taskoj, por enkonduko en la vivon de la plej novaj atingoj de la scienc-teknika progreso.

La bulgaraj esperantistoj, kiel veraj patriotoj kaj konsekvencaj internaciistoj, gajnante novajn

amikojn en ĉiuj mondpartoj, plenvalore utiligas la internacian lingvon Esperanto por popularigi la ekonomian progreson, la socialajn akiraĵojn de la laboruloj kaj la grandajn sukcesojn de nia lando en la sfero de scienco, klerigado, kulturo, literaturo, arto kaj turismo.

En la hodiaŭa streĉa kaj maltrankvila epoko la bulgaraj esperantistoj aktive laboras por triumfo de la pacama ekstera politiko de Popola Respubliko Bulgario, senrezerve subtenas la diversajn paciniciatojn de Sovet-Unio kaj estas en la unuaj vicoj de la batalantoj por paco kaj malmarmado. Ili ĉie kaj ĉiam pruvigis, ke ili estas konvinkitaj pacbatalantoj, ĉar ili scias, ke nur en paca mondo oni povas konstrui la evoluantan socialisman socion, ĉar ili estas atestantoj, ke militarismo malhelpas la normalajn interpopolajn kontaktojn celantajn reciproke konatiĝon kaj amikecon. Ili estas ege maltrankviligitaj, ke estonta term nuklea milito neniiĝus la labor-kreaĵojn de milionoj da homoj.

Akceptu, karaj gekamaradoj, niajn certigojn, ke la bulgaraj esperantistoj faros ĉion eblan por dece bonvenigi la XIII Kongreson de la Bulgara

Komunista Partio. Ili ne domaĝos fortojn, laboron kaj tempon, por ke la vero pri la reala socialismo kaj pri nia ĉarma Patrujo atingu ĉiujn honestajn kaj pacamajn homojn en la diversaj mondpartoj.

Vivu la Bulgara Komunista Partio —
gvidanto kaj inspiranto de niaj
sukcesoj!

Vivu la paco!

Esperanto — en servo de nia prosperanta
Patrujo!

DE LA DELEGITOJ DE LA KONGRESO

Sofio, 6. 7. 1985

Al la
Itala Ambaskado en Sofio,
per la Nacia Komitato por
Defendo de Sergej Antonov

DEKLARACIO

de la 41-a Kongreso de Bulgara Esperantista
Asocio defende al Sergej Antonov

La delegitoj de la 41-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, okazinta la 6-an de julio 1985 en Sofio, unuanime esprimas sian profundan konvinkitecon pri la senkulpeco de la bulgaraj civitanoj Sergej Antonov, Jeljo Vasilev kaj Todor Ajvazov, kulpigitaj pri kompliceo en la atenco organizita kontraŭ la vivon de la kapo de la roma-katolika eklezio papo Johano Paŭlo la Dua.

La juĝproceso kontraŭ la tri bulgaroj en la roma juĝejo montris al la monda publiko, ke la ĉefa atestanto de la juĝproceso — la profesia murdisto kaj teroristo Mehmed Ali Agđa estas ŝakfigureto en la manoj de la imperiismaj fortoj, strebantaj kalumnii nian socialisman patrujn kaj Sovet-Union, akuzante ilin pri terorismo, inciti la publikan opinion kontraŭ la socialisman komunafon kaj

speciale kontraŭ Popolan Respublikon Buglarion.

La novaj senmaskigoj fare de la monda gazetaro ankoraŭ pli konvinke konfirmas la senkulpecon de Sergej Antonov, Jeljo Vasilev kaj Todor Ajvazov. Ĉiu senantaŭjuĝa homo, en kiu ajn mondparto li troviĝus, ne povus resti indiferenta al la sorto de Sergej Antonov, kontraŭleĝe malliberigita jam pli ol du jarojn kaj duonon, entrita en juĝprogreson, sin apogantan sole sur la mensogaj kaj senbazaj depozicioj de profesia teroristo.

Ni varme alvokas ĉiujn esperantistojn en la mondo kaj la objektivan juristan saĝon defende al la bulgara civilano Sergej Antonov, kiu estas viktimo de organizita komploto fare de la imperiismaj sekretaj servoj.

DE LA KONGRESAJ DELEGITOJ

Niaj gastoj salutparolas

Evgenij Tuganov — reprezentanto de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj

Karaj kamaradoj, amikoj,

Varmege ni salutas vin ĉiujn — partoprenantojn kaj gastojn de la 41-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio.

La sovetiaj kaj la bulgaraj esperantistoj havas grandan sperton en la komuna laboro por utiligo de Esperanto por konatigi al la ceteraj popoloj la vivmanieron kaj la sukcesojn de niaj frataj landoj.

La homaro ĉiam bezonis kaj bezonas pacon kaj interkompreniĝon, konfidon kaj amikecon, vigan kulturan komunikadon.

Tio ĉi estas precipe grava nun, kiam la homaro devas defendi la pacan vivon, savi la planedon de la minaco de nuklea katastrofo. Sed estas konate, ke kontraŭ la milito oni devas batali antaŭ ol ĝi komenciĝis. Kaj por tio estas necesaj la komunaj klopodoj de ĉiuj homoj kun bona volo.

Al ni estas agrable konstati, ke la bulgaraj esperantistoj ĉiam estis en la unuaj vicoj de la batalantoj por popola libero kaj feliĉo. Kaj ni estas certaj, ke la bulgaraj esperantistoj, samkiel la esperantistoj el aliaj landoj ankaŭ estonte aktive partoprenos la efektivigon de la pacaj ideoj por internacia kunlaborado kaj sociala progreso sur la tero.

Ni deziras al la kongreso sukcesan laboron, kaj al ĝiaj partoprenantoj — la bulgaraj esperantistoj — bonan sanon kaj prosperon, sukcesojn en la laboro por plua disfloro de socialisma Bulgario!

Vivu la nerompebla frata amikeco kaj ĉiufilanka kunlaborado inter la sovetia kaj bulgara popoloj!

Manfred Arnold, GDR:

Karaj bulgaraj geamikoj kaj gekamaradoj!

Estas por mi granda honoro kaj precipe granda ĝojo, ke mi havas la eblecon partopreni la laboron de via kongreso.

En la nomo de la estraro de la Esperanto-asocio de GDR, en la nomo de la tuta esperantistaro de nia lando kaj en mia propra nomo mi salutas vin el plena koro kaj deziras al tiu ĉi kongreso kaj al ĉiuj esperantistoj de nia frata lando Bulgario plenan sukceson kaj pluan grandan prosperon.

Ni scias, ke la Esperanto-asocio en Bulgario havas longan kaj glorpplenan tradicion. Ĝi estas unu el la plej malnovaj asocioj en la preskaŭ centjara Esperanto-movado, ekzistis kaj batalis seninterrompe ekde jardekoj por nia komuna celo.

La rolo kaj la taskoj de niaj asocioj, nia komuna respondeco kreskas pli kaj pli. Tio rezultas unue el la kreskanta bezono de la homaro al ĉiam pli bona interkompreniĝo kaj due — kaj precipe — el la nuntempa evoluo en la mondo.

La danĝera politiko de la usona administracio kontraŭ Sovetunio kaj la socialisma ŝtataro postulas de ĉiuj pacamaj homoj batali ĉiutage kaj per ĉiuj rimedoj por paco, malarmado kaj malstreĝigo.

La nuntempa situacio postulas ne nur multe pli intime ligitan kunlaboron inter niaj ŝtatoj, sed ankaŭ inter la Esperanto-asocioj de la socialismaj landoj.

Ni esperantistoj havas per nia lingvo apartan eblecon batali por paco, ĉar nia lingvo interligas nin kun homoj en la tuta mondo, kiujn ni devas konvinki pri la neceso de la pacbatalo. Tial ni ankaŭ havas daŭre la devon subteni la aktivecon de la mondaca esperantista movado.

En tiu ĉi senco la Esperanto-asocio de GDR konstante pliprofundigas siajn interrilatojn kun la Bulgara Esperantista-Asocio.

La interrilatoj de bulgaraj kaj germanaj esperantistoj havas tre longan tradicion, dum multaj jardekoj, precipe inter laboristoj-esperantistoj de niaj popoloj.

Antaŭ nelonge ni trovis pluan ekzemplon pri tio: la fama bulgara esperantisto Trifon Hristovski estis konata en nia lando per sia membiografio „Mia vivo“. Multaj legis tiun libron kaj estis kortuŝitaj pro lia sorto. Mi mem trifoje legis la libron kaj estis tiom tuŝita, ke mi skribis poemon dediĉe al li.

Baldaŭ post la apero de la libro oni trovis en

Leipzig la originalojn de leteroj inter Trifon Hristovski kaj la germana esperantisto Walter Dietze el la jaroj 1929 ĝis 1931.

Estis entute 17 leteroj de kamarado Hristovski, kiuj ampleksas 56 paĝojn.

Tiu ĉi leterinterŝanĝo estas eksterordinare interesa, ĉar ĝi okazis inter bulgara komunisto kaj germana senlabora social-demokrato en tia tempo, kiam en Bulgario regis faŝista subpremado kaj en Germanio la faŝistoj preparis sin al ŝtatenverso.

Ĉar mi intense okupiĝis pri la vivo de Trifon Hristovski, la estraro de nia asocio komisiis al mi persone la prilaboradon de tiu ĉi leterinterŝanĝo.

Mi profunde klinas min antaŭ tiu ĉi homo, antaŭ tiu ĉi kriplulo, kiu same estis komunisto, verkisto, esperantisto kaj modelo por ni ĉiuj!

Eva Farkaš-Tatar, Hungario:

Karaj geamikoj,

La prezidiumo de HEA komisiis al mi transdoni salutojn kaj bondezirojn al vi kaj esprimi nian plenan estimon pri via efika agado. Ni deziras al via nuna Kongreso bonan laboron, kiu helpos en la sekvontaj jaroj eĉ pli sukcesplene labori por Esperanto kaj pruvi ĝian gravan rolon por la paco kaj amikeco inter ĉiuj popoloj de la mondo.

Mi havas ankaŭ la honoron transdoni al vi la salutojn de d-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM — en la konvinko ke via unueca, bone organizita laboro signifas fortan apogon por la pacdeziro kaj pacbatalo de ĉiuj esperantistoj.

Kaj nun permesu al mi ion personan: hieraŭ posttagmeze mi vizitis vian nacian historian muzeon. Mi estis tute ravita de la belegaj, bone konservitaj, grandvaloraj trezoroj de la muzeo. Kortuŝite mi vidis apud la kirasoj, sagoj, restaĵoj de imponaj defendaj muroj — laborilojn de pacema agrikultura laboro, falĉilojn, fiŝistajn ilojn ktp.

Same ravis min la arta fantazio de viaj prauloj. Viaj prapatroj volis kaj povis vivi bele. Kun sincera ĝojo mi retrovis la mezepokajn belegajn artobjektojn, konservitaj sur la kolorriĉaj popolaj kostumoj.

Tiu popolo, plena de arta fantazio kaj talento, certe volas gardi la pacon por havi la eblecon evoluigi ĉi tiujn valorojn.

Mi dankas al Esperanto, ke mi sukcesis ekkoni geamikojn el tiu ĉi varmhora popolo! Mi deziras al via Esperanto-Asocio, ke per sia laboro diskonigu la veran vizaĝon de via popolo en la tuta mondo.

Jaroslav Kašparec, Ĉeĥoslovakio:

Karaj gekamaradoj,

Estas por mi granda honoro plenumi agrablan

taskon kaj el tiu ĉi loko saluti la 41-an kongreson de BEA kaj al bulgaraj gesamideanoj transdoni amikajn salutojn de ĉefaj esperantistoj.

La 41-a kongreso de BEA pritraktis ĵus faritan laboron kaj por estontan laboron starigos novajn taskojn — planoj por venonta jaro, kiu estas deklarita Internacia Jaro de la Paco, kaj ankaŭ preparlaboroj por la plej grava okazintaĵo — 100-jara datreveno de Esperanto. Ni estas konvinkitaj, ke la bulgaraj esperantistoj strebos fari ĉion eblan por prospero de la E-movado kaj ke ili donos sian kontribuon por gardi la mondpacon. Mi deziras al la bulgaraj esperantistoj grandajn sukcesojn en tiu laboro kaj permesu al mi, ke mi deziru al la 41-a kongreso de BEA sukcesan traktadon.

Vivu Bulgario, vivu la paco, vivu la amikeco inter la socialismaj landoj!

Gorĝe Dragojlović, Jugoslavio:

Estimataj gekamaradoj,

Permesu al mi saluti, en la nomo de Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj de la tuta jugoslavia es-

perantistaro, la 41-an kongreson de Bulgara Esperantista Asocio, ĉiujn ĝiajn partoprenantojn, kaj transdoni niajn sincerajn dezirojn por ĝia fruktodona laboro kaj plena sukceso. Ni esperas, ke la 41-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj estos plua paŝo en disvastigado de Esperanto en via bela lando, ke la rezultoj, kiujn vi atingas en ĉiutaga laboro sur la kampo de Esperanto, kontribuos por ĝia ankoraŭ pli vasta socia rekono.

La batalo por monda paco kaj interkompreniĝo ne estas facila, sed valoras lukti por akiri tion. Ĉiu ero de amika kunlaboro inter esperantistoj kaj iliaj asocioj el diversaj landoj estas nova perlo en la ĉenero de internacia kunlaboro, kiu — spite al multaj ĉiutagaj minacoj — pravas, ke paco kaj interkompreniĝo ne estas neatingeblaj idealoj. La esperantistoj ne povas solaj venki en tiu batalo, sed ili povas multe kontribui al ĝi. Por ni, vivantaj sur la Balkana Duoninsulo, unu el la ĉefaj taskoj estas por eterne transformi ĝin el ĉama „barelo de pulvo“ en regionon de paco, kies popoloj vaste kunlaboros sur ĉiuj kampoj. Niaj du asocioj — Bulgara Esperantista Asocio kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo, povas multe kontribui por tio, donante tiel bonan ekzemplon al aliaj esperantistaj organizaĵoj.

CENTRA ESTRARO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Angel Hristov Todorov
Antoaneta Kostadinova Mihajlova
Anton Simeonov Antonov
Belčo Dimitrov Varsev
Belka Hristova Beleva
Bojčo Ljubomirov Mladenov
Bojidar Leonov Stefanov
Boris Vasilev Gaĝanov
Boris Ivanov Kolev
Canko Petrov Murgin
Cano Todorov Ignev
Conka Ganĉeva Toĉeva
Cočo Danĉev Kolarov
Cvetana Hristova Stamenova
Cvetana Jordanova Zareva
Cvetka Todorova Miteva
Cvjatko Todorov Stojanov
Dimitrina Ljubenova Tonĉeva
Dimităr Atanasov Mutuŝev
Dimităr Atanasov Hristov
Dimităr Ivanov Haĝiev
Dimităr Ljubenov Jdrakov
Dimităr Nikolov Dimitrov
Dimităr Stojanov Marev
Dimităr Stojanov Papazov
Dimităr Peŝkov Stojanov
Dimităr Todorov Ivanov
Dimo Jekov Trudoljubov
Dobrinka Hristova Trăpkova

Donĉo Simeonov Hitrov
Draguŝko Simeonov Petrov
Elena Ivanova Stojkova
Elena Vasileva Popova
Emil Simeonov Ĉirpanski
Emilija Cvetkova Kanjovska
Enjo Kostadinov Enev
Evĝeni Vasilev Georgiev
Evtim Cvetkov Anĉev
Fani Mileva Mihajlova
Ceno Stojanov Manev
Genoveva Stojanova Ranĉeva
Georgi Ivanov Cvetkov
Georgi Ivanov Litov
Georgi Marinov Dobrev
Georgi Markov Gergov
Georgi Idakiev Pavlov
Georgi Todorov Nejkov
Georgi Vasilev Kaljaŝki
Haĉik Dikran Haĉikjan
Haim Buko Levi
Hristo Daĉev Daĉev
Hristo Manolov Hristov
Hristo Marinov Gorov
Hristo Asenov Kerelezov
Ilija Atanasov Iliev
Ilijana Mihajlova Metodieva
Ilka Angelova Nikolova
Ivan Apostolov Trajkov

Ivan Dimitrov Keremidčiev
 Ivan Dečev Dečev
 Ivan Kirčev Ivanov
 Ivan Milanov Čulev
 Ivan Petrov Pacov
 Ivan Petrov Terziev
 Ivan Slavov Ivanov
 Ivan Tanev Peev
 Ivanka Kirčeva Stojanova
 Jordan Dimitrov Angelov
 Jordan Nikolov Jotov
 Kanjo Mitev Kanev
 Kiril Petkov Popov
 Kiril Petrov Velkov
 Kunčo Ivanov Válev
 Krástju Dimitrov Petkov-Karučín
 Lalo Cankov Lalov
 Ljubomir Aleksandrov Trifončovski
 Ljubomir Dimitrov Miňajlov
 Margarita Slavčeva Todorova
 Maria Borisova Labova
 Maria Stojanova Toleva
 Maria Miňajlova Kojareva
 Maria Najdenova Pejкова
 Maria Nikolova Rajčeva
 Metodij Ivanov Angelov
 Milčo Ivanov Mačokov
 Mitko Ivanov Dimčev
 Mitrofan Vasilev Velev
 Momčo Tanev Momčov
 Nadejda Litova Glavčeva
 Nadejda Petrova Sirkova
 Nano Canov Kjućukov
 Nedko Georgiev Nedev
 Nejko Kunev Atanasov
 Nenka Ljubenova Stefanova
 Neno Stefanov Janev
 Nikola Atanasov Uzunov
 Nikola Bogdanov Aleksiev
 Nikola Borisov Nikolov
 Nikola Petkov Mitev
 Nikola Pilev Mitev
 Pepa Ivanova Bojanova
 Petár Angelov Todorov
 Petko Candev Petkov
 Petko Ivanov Bonev

Petko Petkov Todorov
 Petko Petrov Arnaudov
 Radoslav Ivanov Paraškevov
 Rumen Ognjanov Bukov
 Ruska Genadieva Pavlova
 Sava Atanasov Dálbokov
 Serafim Stojanov Serafimov
 Sevo Rusev Sevo
 Slavka Koleva Obreškova
 Snejana Atanasova Angelova
 Spiridon Nedjalkov Petrov
 Stefan Petrov Raškov
 Steliana Jankova Dimitrova
 Stojan Nikolov Pavunčev
 Stojan Petrov Kostadinov
 Stojčo Cankov Todorov
 Stojčo Cočev Soškov
 Sterju Kukušev Zamfirov
 Todor Avramov Ninov
 Todor Georgiev Petkov
 Trifon Blagoev Trifonov
 Válka Mirčeva Dobreva
 Vasil Pešov Vutov
 Vasilka Antonova Cvetkova
 Venecij Georgiev Velikov
 Venelin Ivanov Vasilev
 Violin Canev Oljanov
 Vladimir Todorov Jelev
 Vera Todorova Ivanova
 Veronika Josifova Dimitrova
 Veska Dragostinova Minčeva

CENTRA KONTROLA KOMISIONO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Georgi Nikolov Dolapčiev
 Jordan Doksímov Čaljevski
 Jordan Dimov Koev
 Viktor Iliev Cenov
 Nikola Ignatov Mladenov
 Stojan Kojnov Totev
 Stefka Minkova Markova
 Ĥristo Krástev Ivanov

MEMBROJ DE LA BUROO DE CE DE BEA

Nomo	Posteno en BEA	Respondecas pri distrikto	Komisiono
Ĥristo Marinov Gorov	Prezidanto	distrikto Sofio	Financa komisiono, el- donkomitato
Petár Angelov Todorov	Vicprezidanto pri la internacia agado	Vraca- kaj Vidin- distriktoj	Sekcia konsilantaro, konstruado de produk- tiloj

Nano Canov Kjuĉukov	Vicprezidanto	Pleven- distrikto	Kultur-kleriga komisiono
Dimitâr St. Papazov	Generala sekretario	distriktoj de Sofio, Burgas kaj Silistra	Organiza kaj administra komisionoj
Angel Ĥr. Todorov	Sekretario pri la instru-problemoj, ĉefdirektoro de IEK	distriktoj de Smoljan kaj Razgrad	Instru-metodika komisiono, la ekspozicio
Violin Canev Oljanov	Ĉefredaktoro de „Paco“	distrikto de Pazarĝik	Instruista sekcio, Filatela sekcio
Georgi Todorov Nejkov	Membro de la Buroo	—	Fervojista sekcio
Dimitâr Atanasov Mutuŝev	Ĉefdirektoro de la ekonomia agado	distriktoj de Miĥajlovgrad, Ruse, Jambol	Kooperativa sekcio, Turista sekcio
Donĉo Simeonov Ĥitrov	Ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“	distriktoj de Blagoevgrad, Pernik	Propagando, kino kaj foto
Ivan Milanov Ĉulev	Prezidanto de la Sofia Distrikta Estraro de BEA	—	Pervida agitado (propagando)
Jordan Dimitrov Angelov	Prezidanto de DE de BEA — Plovdiv	distriktoj de Ĥaskovo kaj Kârgali	—
Kiril Petkov Popov	Membro de la Buroo	distriktoj de Veliko Târnovo kaj Sumen	UMEA, Medicina sekcio
Krâstju Karucin Petkov	Membro de la Buroo	distrikto de Stara Zagora	Dokumentado, Muzeo
Kunĉo Ivanov Vâlev	Membro de la Buroo	Distriktoj de Gabrovo kaj Kjustendil	Amatora artagado, BET
Nikola Bogdanov Aleksiev	Redaktoro de „Pacaktivulo“	—	MEM, TEJA
Canko Todorov Ignev	Membro de la Buroo	Loveĉ-distrikto	Domoj de la Kulturo
Cvetana Ĥr. Stamenova	Prezidanto de UE de BEA — Sofio	—	—
Cvetka Todorova Miteva	Instrukciisto pri la kadroj	distriktoj de Tolbuĥin kaj Sliven	TEJO, BEJ
Georgi Nik. Dolapĉiev	Prezidanto de la Centra Kontrolo Komisiono de BEA	Varna-distrikto	

REZULTOJ

de la antaŭkongresa konkurado omaĝe al la 41-a Kongreso de BEA

E-societoj:

Unua premio: Societo „Trifon Ĥristovski“ — Botevgrad
Dua premio: Societo „Radio“ — Pazarĝik
Tria premio: Societo „Nikola Botuŝev“ — Sofio
Societo „D-ro St. Vasilev“ — Sofio
Speciala premio: Uzina societo „Evtim Apostolov“ — Gabrovo
Kuraĝiga premio: Kooperativa societo „Verda Stelo“ — Ruse

Distriktaj estraroj:

Unua premio: Distrikta Estraro — distrikto de Sofio

Dua premio: Distrikta Estraro — Gabrovo

Tria premio: Distrikta Estraro — Veliko Târnovo

Speciala premio: Urba Estraro — Sofio

Sekcioj ĉe BEA

Unua premio: Fervojista sekcio

Dua premio: Medicina sekcio

Tria premio: Turista sekcio
Poŝtista sekcio

Speciala premio: Sekcio de Blindaj Esperantistoj

SUKCESPLENA SESIO DE ISEU'85

Unu el la plej gravaj aranĝoj en la ĉi-jara plano de BEA estis la Tria Internacia Somera Esperanto Universitato, okazinta la 20-27-an de julio j. k. en Veliko Târnovo. Tiu jam tradicia iniciato multe kontribuas por popularigo de la Internacia Lingvo en Bulgario. Aliflanke la internacia aŭditorio de ISEU havis la eblecon ĝui altnivelan Esperanton kaj samtempe akiri diversajn konojn el la ĝeneralaj sciencoj, samkiel pri lingvistikaj kaj esperantologiaj problemoj.

La 21-an de julio matene en la aŭlo de la Universitato „Kiril kaj Metodij“ okazis la solena inaŭguro de la Tria Seso de ISEU. Ĉeestis pli ol 150 partoprenantoj kaj gastoj, al kiuj bonvenigajn parolojn direktis la ĉi-jara rektoro de ISEU prof. Stanjo Georgiev:

— La universitato „Kiril kaj Metodij“ en Veliko Târnovo fieras pri la alta honoro esti dommastro de la Internacia Somera Esperanto-Universitato — li diris. — La vigla laboro de nia ISEU estas pruvo, ke Esperanto ĉiam pli evoluas kiel ilo de komunikado.

La kuranta jaro estas speciale rimarkinda por Veliko Târnovo kaj ties universitato, ĉar pleniĝas 800 jaroj de la ribelo de la bulgaroj kontraŭ la bizanca juĝo kaj la restarigo de la bulgara ŝtato en 1185 jaro. Kiel ĉefurbo de Mezepoka Bulgario, Veliko Târnovo estigis centro de kulturo kaj arto, al kiu strebis soifantoj pri klereco homoj el balkanaj kaj eŭropaj landoj. Nia universitato heredis la plej bonajn tradiciojn de la Târnova Literatura Skolo. Ĝi havas vastajn internaciajn rilatojn kaj kunlaboras kun multaj universitatoj en eksterlando. Tiu nia internacia agado efektiviĝas ankaŭ per la Somera Esperanto-Universitato.

Varmajn kaj flatajn salutvortojn adresis al la ĉeestantoj ankaŭ la vic-prezidanto de la Komunuma Popola Konsilantaro de Veliko Târnovo Dimo Minĉev, la membro de CE de BEA Kunĉo Vâlev, la vic-rektoro de ISEU d-ro Detlev Blanke el GDR, magistro Zofia Nagorska el Pollando. D-ro Blanke donacis al la rektoro de ISEU prof. Georgiev ekzempleron de la romano „Nuda inter lupoj“ de la germana verkisto kontraŭfaŝisto Konrad Wolf, lukse eldonita.

Tuj post la malferma ceremonio la Tria ISEU komencis sian laboron. Docento Nevjana Donĉeva el la Universitato en V. Târnovo faris la unuan prelegon pri temo „La Târnova Literatura Skolo kaj la slavaj literaturoj“, riĉe ilustrita per lumbildoj: ilustraĵoj de verkoj de elstaraj reprezentantoj de la Târnova Literatura Skolo — patriarko Evtimij, Grigorij Camblak, Konstantin Kosteneĉki, Josif Bdinski, k. a. La prelego estis simultane tradukita en Esperanto fare de Kunĉo Vâlev, kiu demonstris modelan tradukmajstrecon. Tiu ĉi kompetenta scienca esploro kaj la prelego de Petâr Slavĉev „Mezepoka Târnovo“ — ĉefurbo de Bulgario“ prezentis al la aŭskultantoj detalan bildon de tiu centro de la bulgara spirito kaj kulturo, ligita kun la multjarcenta historio de la bulgara popolo.

La lekcioj de d-ro Detlev Blanke („Evoluo de Esperanto“, „Instruoj de la historio de la planlingvoj“), de d-ro Erich Krause el la Universitato de Leipzig („Evoluo de la leksiko de Esperanto“ kaj „La neologismoj en Esperanto“), de s-ino Vera Dehler („El la historio de la faklingva normigado“) — ĉiuj el GDR, prezentis ampleksajn lingvistikajn aspektojn de la problemoj pri konstanta evoluo de la Internacia Lingvo. El-



Salutparolas la rektoro de la Tria ISEU prof. Stanjo Georgiev

staraj lingvistoj, la gastoj-prelegantoj el GDR traktis la temojn en altnivela Esperanto, ilustris siajn lekciajn per multaj konkretaj ekzemploj pere de speciala skribprojektoro („schreibprojektion apparatur“). Tio multe helpis la aŭskultantojn pli facile asimili la materialon.

Alian grupon de lingvistikaj demandoj tuŝis en siaj prelegoj prof. d-ro Stojan Guĝev, vicprezidanto de la Esperanto-Akademio („Komplekso de malplivaloro ĉe la lingvoparolantoj“ kaj „La Interlingvistiko — scienco eksperimenta“), Kunĉo Válev („La lingva deveno de Esperanto“ kaj Neno Janev el Gabrovo („Tiklaj lingvaj problemoj en Esperanto“).

En siaj du lekciaj „La komputiloj — specoj, evoluo, aplikado“ kaj „Algoritmoj kaj programigo“ docento Stojko Stojčev traktis el tre interesa vidpunkto la problemon pri praktika aplikado de Esperanto en la vivo.

Profundan analizon kaj tute praktikajn konsilojn pri la informado kaj argumentado rilate Esperanton faris en sia prelego Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“. Surbaze de sia profesia ĵurnalista sperto kaj de opinioj de fakuloj el aliaj landoj li priskribis la staton de la informado kaj argumentado pri Esperanto en diversaj socimediaj. D. Ĥitrov montris seriozajn malperfektaĵojn de nia laboro por varbado de novaj adeptoj de la Internacia Lingvo, kiu ofte ne evitas sektismajn aspektojn kaj provokas skeptikajn ridetojn ĉe la diskutpartneroj. „Informadi kaj konvinkadi ne per patosa esperantista sindonemo, sed per seriozaj sciencaj lingvistikaj argumentoj“ — ĝeneraligis siajn konsiderojn pri la traktata temo la preleginto.

Ĉiuj prelegoj ekscitis vivan intereson ĉe la

partoprenantoj, kiuj starigis multajn demandojn, montris bonan preparitecon pri la temoj kaj bonan lingvan nivelon en la diskutoj.

Tre saĝa estas la propono fare de multaj partoprenantoj, nome ke la organizantoj surbendigu kaj eldonu en apartaj broŝuroj la prelegojn de la tri sesioj de ISEU en Veliko Târnovo.

En la aŭlo regis vera internacia etoso. Estis agrable denove konstati la bonan preparlaboron de la esperantistoj el Veliko Târnovo, ĉe-kape kun la prezidanto de DE de BEA arkitekto Stefan Raŝkov, Maria Pejкова, Olga Cankova, Nikola Najdenov, k.a., kiuj zorgis pri la favoraj labor- kaj vivkondiĉoj de la partoprenantoj en la ĉi-jara ISEU.

Aparte riĉa kaj varia estis la amuza programo: trarigardo de la malnova bulgara ĉefurbo kaj ĝiaj vidindaĵoj, tuttaga ekskurso al la arkitektura rezervejo, „Etâr“ apud Gabrovo, al la historia montosupro „Stoletov“ kaj al monaĥejo Sokolski, vizito de la nacia ekspozicio de la folkloro aplikata arto, inaŭguro de ekspozicio de du esperantistinoj el V. Târnovo — Margarita Ivanova (numismatiko) kaj Cvetana Daĉeva (aplikata arto), amika interkona vespero.

La ĉi-jara partopreno en ISEU de relative granda nombro da esperantistoj el Bulgario kaj el eksterlando pruvas la gravan rolon de la Internacia Somera Esperanto-Universitato por plua disvastigo kaj celkonforma aplikado de la Internacia Lingvo en la scienc-praktika sfero. La perspektivo estas tre kuraĝigaj kaj ISEU en Veliko Târnovo digne vicigas inter la ceteraj universitataj Esperanto-aranĝoj en la mondo.

RADI BANĈEVSKI

RONDO DE ESPERANTISTAJ FLAŬRISTOJ

De la 27-a de majo ĝis la 1-a de junio 1985 okazis la seminario „La nomoj de sovaĝaj plantoj en Esperanto“ en la Kultura Centro Esperantista (K.C.E.) en la La-Chaux-de-Fonds (La ŝod fon) en Svislando, dum kiu estis fondita la supre nomita rondo de esperantistaj flaŭristoj (R.F.E.). Kiel sekretario oni nomumis s-ro R. H. Bosson, Floraplein 23, NL-5644 JS Eindhoven.

Kiel celojn de la rondo oni akceptis: kompletigi la nomenklaturon de sovaĝaj plantoj; viziti floriĉajn lokojn; interŝanĝi spertojn pri flaŭro.

Kiel sidejon de la rondo oni elektis K.C.E. Oni decidis organizi ĉiun jaron t. n. liberan kunvenon, kiujn organizos s-ro B. Eichkorn, Kolpingstr. 8, D-7790 Messkirch.

Kvankam ne ĉeestante la seminarion, grave kontribuis al ĝi prof. Paul Neergaard, la konata esperantisto kaj plantpatologo, laŭ kies ideoj

kaj direktivej oni laboros. Kiel bazon de la plant-nomaro oni prenis la valoran verkon de s-ro Wouter Pilger (vaŭter pilĝer) titolitan „Provizora privata listo de komunlingvaj nomoj de plantoj en nord-okcidenta Eŭropo“ (eldonejo Vulpo Leekerhoek 26, NL-8223 ZS Lelystad) kaj decidis daŭrigi kaj plivastigi lian laboron.

Tiucele la rondo bezonas la nomojn de sovaĝaj plantoj en multaj lingvoj (escepte de la germana kaj nederlanda), prefere laŭ la vicordo uzita en la Provizora Listo de Pilger, kun aldono de eventualaj popolaj nomoj. La lastaj, se eble, tradukitaj en Esperanto por eventuala uzado en esperantlingva popola nomo. Poste la nomoj estos ordigitaj komputile laŭ alfabeto sinsekvo por fari la nomaron facile uzebla ankaŭ por laikoj.

R. BOSSONG, Nederlando

RADKA B. STOJANOVA

SEPTEMBRO 1923

Tra kampar', arbar' silenta
fluas la river' argenta,
ĝin travadas per biciklo
juna korpulenta viro.

Kiu estas li? — Boriso¹,
kuriero-komunisto,
kiu kaŝas ĉe la koro
pri ribel' signalparolon.

Portas li signalon gravan:
par' da vortoj, kiuj flamas,
„serpo kaj martelo“ signas
punon al faŝist' malinda.

Par' da vortoj ruĝkoloraj,
kiuj la liberon gloras
kaj bruligas korojn ili
al batalo klasa iri.

Ĉe arbara vojkurbiĝo
batalantoj kolektiĝas;
komunistoj, agraranoj
sin preparas por atako.

Jen alvenas per biciklo
kuriero kaj koncize
li raportas al la ĉefo:
„Ni ribelos noktomeze!“

Voĉo de la ĉefo brulas
en la koroj de l'bravuloj:
— Kamaradoj, venis horo
por batal' decida, glora!

Noktomezo. En mallumo
sturmas oni komunumon.
Sen sangverŝo, kontraŭstaro
venkas la ribelularo.

Brilas la maten' argente
ĉe la fora firmamento;
flirtas ruĝa silka flago
en septembra suna tago.

Ĉefo legis la dekreton
pri popola regpotenco.
Kamparanoj sur la placo
Ĝojis kaj jubilis pace.

Ĝojo tamen efemeris:
el la urb' taĉmento venas
kaj atakas sen kompatato
homamason sur la placo.

Marŝas volontuloj blankaj,
kaptas la gvidantojn bravajn.
Bojas la maŝinpaŝiloj
ĉe arbaro la tilia.

Morto ŝvingas la falĉilon,
morton semas homgoriloj,
sed neniu el viktimoj,
kompatpetis kaj ne timis.

Tio estis septembranoj —
komunistoj, agraranoj.
La vunditojn oni trenis,
en prizonon ilin tenis.

En la kaĝoj de l' karceroj
ili flegis la esperon,
ke disfalos altaj muroj
sub la frapoj de l'junuloj.

La geidoj de l'kaptitoj
partizanis en Pirino,
en Rodopo kaj Balkano. . .
Venkis fine la tiranojn

dank' al karaj fratoj-rusoj,
travadintaj la Danubon. . .
Kaj ekfloris en septembro
nova vivo — por eterne.

¹⁾ La poemo estas dediĉita al mia karmemora patro Boris Monahov.

CANKO MURGIN

ZORGU LAND' PRI MONDA PACO!

Al la 41-a Kongreso de Bulgaraj Esperantisto

Lando mia — izumruda¹,
amo mia — rev' ekskluda² —
lukt' okazis tre impeta
kaj Liber' el man' proleta
venis al vi altruisme —
vi eliris el-abisme! . .

Vin dekoris Bunta Belo
dum la Liberig-Ribelo —
helpis al vi Frat' — Amiko
— ho, kioma romantiko, —
nun vi mane kosmon tuŝis³
kaj progreson alten puŝis!

Lando mia — Bulgario —
en Kontrakt' de Varsovio⁴
de la Bon' vi — konstruanto,
de la Bel' vi — ruĝ-dianto⁵ —
zorgu, Land', pri monda paco,
zorgu tra la tuta spaco!

Malamikoj niaj spitas —
krome ili klaĉe splitas
kaj celadas al milito
eĉ en kosmo — jen malsprito —
sed homaro volas vivi
kaj ne — en hazardo — drivi!

Zorgu, Land', pri monda paco,
zorgu vigle, kun aŭdaco —
esperantistar' bulgara
vokas vin per voĉo klara:
„Zorgu, Land', pri vivo suna,
zorgu pri homar' komuna!“

1985. 07. 06.

¹⁾ Izumruda: bunte smeralda; koloroj herboverda, marblua kaj aliaj, kaj ĉiu el ili en pluraj nuancoj; fajne bela.

²⁾ Ekskluda: ekskluziva, unika, neripetebla.

³⁾ En 1979 la unua bulgara kosmonaŭto-esploristo Georgi Ivanov flugis per sovetia kosmoŝipo tra la kosma spaco ĉirkaŭ la Tero.

⁴⁾ La Organizo „Kontrakto de Varsovio“ estas fondita en 1955 kaj unuigas en si la ŝtatojn de reala socialismo.

⁵⁾ Dianto: la ruĝe floranta speco de tiu floro estas simbolo de revoluciaj penso, agado kaj jaro.

„BULGARA ESPERANTISTO“

**ABONU! FARU ABONON ANKAŬ POR
VIAJ AMIKOJ ALILANDE!**

- UNU EL LA PLEJ MALNOVAJ E-REVUOJ EN LA MONDO — FONDITA EN 1919
- GRANDA FORMATO, RIĈE ILUSTRITA
- AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA E-MOVADO EN BULGARIO KAJ EN ALIAJ LANDOJ
- LIBERA TRIBUNO DE LA LEGANTO
- SPECIALAJ RUBRIKOJ: „ENLANDA MOVADO“, „TRA LA E-MONDO“, „VERDAJ STELETOJ“, „HEROA PASINTECO“, „DEZIRAS KORESPONDI“, „TRA LA GAZETARO“ KA.
- LITERATURO, POEZIO, RECENZOJ

Jarabono por 1986: por Bulgario — 2,90 lv
por socialismaj landoj — 5,42 lv
por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90

Ne prokrastu fari vian abonon por 1986! Lasta limtempo — 10-a de decembro 1985

Abonu tuj pere de REP, la eldonkvanto estas limigita.

Esperantaj societoj, esperantaj aktivuloj — ni nepre plenumu la decidon de la 41-a kongreso de BEA: ĉiu esperantisto — abonanto de „BULGARA ESPERANTISTO“!

NOVAJOJ EL KUBO

Ĉiuj interesigantoj pri la Esperanta eldono de „La historio absolvos min“, sindefende de la ĉefkomandanto d-ro Fider Kastro dum la juĝo pro la atako al la Monkada Kazerno en 1953, povas mendi la libron ĉe Kuba Esperanto-Asocio (KEA).

Nuntempe ekzistas kaj funkcias en la lando 14 lernejoj, kie la gelernantoj ne nur lernas la lingvon, sed ankaŭ trovas eblecon praktiki ĝin.

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BORUVANSKI, Radoslav DOJĈINOV, Prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN

Administranto — Asen JOSIFOV

ENHAVO

M. JANKOVA-BOJAĜIEVA. Impona kongreso II Ĥr. GOROV. Nova etapo en la evoluo de nia E-movado	11
***** Kongresaj salutparoloj	5, 7, 9, 11
***** Kongresaj dokumentoj	8
***** Nova Centra Estraro de BEA	11
***** Rezultoj de la kongresa konkurado	13
R. BANĈEVSKI. Sukcesplena sesio de ISEU	14
*****Poezio:	
R. STOJANOVA. Septembro 1923	16
C. MURGIN. Zorgu land' pri monda paco	16
S. DIMITROVA. Esperantaj voĉoj en la Asembleo	14

Sur la unua kovrilpaĝo: La 41-a kongreso de BEA kunsidas.

Fotoj: Krum Janev

KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ mane skribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno (sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpitaj per majuskloj). La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj okazoj — ĝis 90 linioj, sur blankaj paperfolioj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajposignoj (inkluzive la intervortajn spacojn).

La redakcio akceptas la originalan (unuan) ekzemplaron de la tajpajo, ne kopion. Skribu klare viajn nomojn kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondadojn pri okazintaj eventoj oni sendu ĉiam tuj post la aranĝo. La grupfotoj estu interesaj, movoplenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en poŝtkarta formato.

Limdato por kontribuoj: La materialoj venintaj ĝis la 15-a de la koncerna monato, povas aperi en „BE“ ne pli frue ol post du monatoj.

La redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

KEA pretigas Internacian Libro-Foiron de Esperanto, efektivigotan dum julio venontjare kun la celo disvastigi la E-literaturon kaj elmontri la taŭgecon de la lingvo ĉiukampe. Por tion tiel plenumi ni petas ĉies helpon rilate al la sendo de materialoj por prezenti ilin en la ekspozicio.

LIC. MARITZA GUTIÉRREZ GLEZ,
sekretariino pri propagando, KEA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario P. K. 66
tel. 31-70-19 1 000 Sofio
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

ESPERANTAJ VOĈOJ EN LA ASEMBLEO

En la tutmonda kultura vivo kaj en la internacia pacmovado la Internacia Infana Asembleo „Standardo de la paco“ estas unika evento. Ĉi-jare jam trian fojon Bulgario akceptis centojn da talentaj infanoj el 110 landoj. Sub la slogano „Unueco, kreado, beleco“ dum dek tagoj la junaj senditoj de la paco elmontris siajn kapablojn



Bonege kantis kaj dancis infanoj el Jugoslavio

en diversaj sferoj de l'arto, sed ankaŭ travivis neforgeseblajn momentojn de amikaj renkontiĝoj, amuziĝo, ekskursoj en agrabla korvarma internacia etoso.

La brila ideo de la neforgesebla filino de la bulgara popolo Ljudmila Jivkova kunvenigi en Bulgarien junajn talentulojn el ĉiuj partoj de la planedo kaj unuigi ilin por amika paca kunlaborado denove realigis plensukcese. Denove sonradis la sonoriloj de la monumento „Standardo de la paco“, simbolanta la volon de la infanoj el la tuta mondo vivi kaj kunlabori en la nomo de la paca kunekzistado.

Al la voĉoj de la monda infanaro aliĝis ankaŭ tiuj de pli ol 40 junaj geesperantistoj el diversaj landoj. Por unua fojo la asembleon „Standardo de la paco“ oficiale partoprenis delegitaro de infanoj-geesperantistoj. Dank'al la ĉiufanka helpo de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio kaj al la sindona preparlaboro de la aktivuloj de BEA Steliana Dimitrova kaj Maria Angelova la ideo pri internacia partopreno de infanoj-geesperantistoj en la Asembleo sukcese realiĝis. Venis infanoj kun siaj gvidantoj el Grekio

(7), el Hungario (5) kaj el Jugoslavio (6). Bulgario estis prezentita de 5 infanoj kaj ankaŭ per partopreno de la esperantista junpionirakantgrupo el Bojuriŝte „Diverskoloraj Kravatoj“. Ili ĉiu prezentis ne sian landon, sed unu grandan ideon — paca kunlaborado pere de la internacia lingvo Esperanto.

La infanoj-geesperantistoj faris grandan impreson al siaj junaj amikoj el aliaj landoj kaj per la komuna lingvo, kiun ili parolis, kaj per sia arta programo. Kelkfoje ili sin prezentis en la Nacia Palaco de Kulturo „Ljudmila Jivkova“ dum la koncertoj okazintaj la 11-an kaj 12-an de julio j. k. En la Klubo de la junaj intelektuloj Marta kaj Stefani Hagiev brile ludis je kvar manoj muzikaĵon por piano de Jul Levi. Katja Ivanova (I premio en Haskovo '85) ravis la publikon per plenumo de popolkantoj en Esperanto. Sin majstre akompanis per liuto Manol Kovacev. La greka grupo bonege dancis kaj entuziasmigis la ĉeestantojn dum la danespektaklo. La jugoslavaj infanoj gajnis I kaj II premiojn pro siaj pentraĵoj sur asfalto.

Unu el la interesaj kaj emociaj arangoj de la riĉa Asemblea programo estis la renkontiĝo de infanoj-geesperantistoj kun infanoj el diversaj landoj en la Klubo de Internacia Amikeco en la Studenta Urbeto apud Sofio. La koncerton de la infanoj-geesperantistoj ĉeestis membroj de la Estraro de BEA kaj multaj infanoj el Brazilo, Grekio, Malto, Togo, Benino, Hispanio, Cipro k. a. En la klubeto regis vere internacia agrabla amika etoso.

Lerte gvidis en Esperanto la riĉan, varian programon kaj samtempe talente recitis Daniela Denĉeva el Sofio (13-jara), premiita en konkursoj de Boteva kaj Vapcarova poezio. Sonis recitaĵoj kaj kantoj en Esperanto, kiuj forte impresis la junajn ĉeestantojn. En la fino de la programo, ĉiuj infanoj kune rondodancis, entuziasmigita de la internacia lingvo Esperanto. La gvidantinoj de la infanaj folkloraj ensembloj el Togo kaj Benino esprimis ardan deziron lerni kaj instrui al la infanoj Esperanton. La prezidanto de BEA Hristo Gorov promesis ĉiufankan helpon por realigo de tiuj deziroj.

Intervjuoj kun infanoj-geesperantistoj kaj kun iliaj gvidantoj estis elsenditaj per la Bulgara Televido kaj Radio. Saluttelegramojn al la organizantoj de la Asembleo kaj al la junaj Esperantistoj sendis prof. d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, s-ino Maria Pontika, prezidantino de Helena Esperanto-Asocio, E-asocioj el diversaj landoj, iuj jam publikigitaj en bulgaraj gazetoj.

Dum la neforgeseblaj tagoj de la Asembleo, per sia partopreno en diversaj programoj — koncertoj, renkontiĝoj, ekskursoj, sportaj konkursoj, k. a. la infanoj-geesperantistoj ĉie provokis viglan intereson kaj estis la plej bona ekzemplo de internacia interkompreniĝo pere de Esperanto.

STELIANA DIMITROVA,
respondeculino pri E-partopreno
en la Asembleo „Standardo de la paco“ 85